



Kulturaj Kajeroj

É. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Jarabono : 40 fkoj

13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1979 - 5

El Grésillon

LA ESPERANTO-DOMO (SEKVO DE LA UNUA CIRKULERO)

« La bieno povus kosti 4.500.000 (1) frankojn. Necesus 1.500.000 frankoj por ĉiuj necesaj pliboniĝoj. Mi kalkulas maksimume. Ni bezonus do 6.000.000 frankojn entute. Kiel havigi al ni tiun sumon ? Per prunto kompreneble. Sufiĉus ke 600 esperantistoj pruntedonu po 10.000 frankoj kaj ni havus la sumon. Ni devus krei kooperativan asocion... Mi povas aserti, ke la domo havos grandan sukceson. Sed estas alia punkto favora : mi estas preskaŭ certa, ke, ekster la esperanta movado, estus facile luigi la domon por oficialaj studperiodoj de Popola Edukado. La pruntedonantoj riskos nenion ĉar la bieno estos garantiataj.

Mi sendas tiun alvokon nur al centoj da esperantistoj. Kion mi petas ? Ke ili simple diru, ĉu, se ni povos realigi la projekton, ili estus pretaj pruntedoni iun sumon kaj kiamaniere. Ni ĉefe petas, ke ili respondu, ke ili diru, kion ili opinias pri la projekto. Se, post tiu unua alvoko, ni vidas, ke ni povas daŭrigi, ni faros alian, pli vastan alvokon. »

Jen la unua ŝtono de la Esperanto-Domo. Estis forta ŝtono ĉar Micard antaŭvidis ĉiujn detalojn, ĉiujn argumentojn kaj kontraŭargumentojn, streĉe pripensitaj dum sendormaj noktoj.

Baldaŭ la respondoj al tiu alvoko venis el ĉiuj partoj de Francujo. Ili estis kuraĝigaj kaj preskaŭ ĉiuj promesis monon. Tio sufiĉis por Micard kaj li tuj komencis traktadojn por akiri bienon en Sablé-sur-Sarthe. Sed la afero rapide fiaskis.

Tiam komenciĝis duobla serĉado. Unue Micard devis trovi taŭgan lokon por la venonta Somera Lernejo. Due serĉi alian domon por realigi la planon de Esperanto-Domo. Tiu serĉado ne estis pli facila ol la unua : Micard pacience legis la anoncojn en la gazetoj, kaj vizitis la bienojn kies priskriboj estis allogaj. Pro tiuj necesaj vizitoj, kaj ĉar li konsciis, ke li devos tre ofte vojaĝi inter sia propra domo kaj la Esperanto-Domo post la aketo, li serĉis domojn nur en la proksima regiono kaj tio malpli grandigis la eblecojn. Li tamen trovis sufiĉe taŭgan domon en urbeto Brulon.

Rapide venis la somero ; en julio 1951 aperis speciala numero de « Esperanto Lernejo », tiam revuo de GEE, en kiu estis presita la « cirkulero al la Esperantistoj ». Jen kiel, per tre persona stilo, Micard prezentis la aferon :

« Amikoj, neniam GEE petis tiom pezan sed fruktodonan taskon de vi. Se vi sukcesos, vi estos, kredo min, belege servintaj la esperantistan movadon. Kion vi devas fari ? Promesi al ni monon : 50.000 (1), 20.000, 10.000, 5.000, ĉiu laŭ sia ebleco. Bieno garantios vian prunto. Sed ĉifoje pli ol iam ajn, vi devas mem agi. Ne diru : « La najbaro sendos monon ». Jes li sendos monon, sed via helpo devas aldoniĝi al lia. Neniu estas riĉega sed per kolektiva asocio, ni trovos, se vi volos, la milionojn necesajn por ke fine grandiĝu la esperanta movado. Amikoj, vi havas la parolon ».

Ek de tiu dato, dum pluraj monatoj, ĉiu numero de Esperanto-Lernejo alportis tian alvokon. Neniam Henri Micard trovis la 600 esperantistojn, kiuj pruntedonus po 10.000 foj. Kaj la konstanta demando estis, por tiu homo, kiu en sia propra domo neniam volus aketi iun aparaton se li ne havus la necesan sumon en la poŝto : « Ĉu ni povos pagi en la ĝusta tempo ? ».

En septembro 1951 Sro Philippe, arkitekto, prezidanto de la Franca Esperanto Asocio venis en Brulon por viziti la domon kun gesinjoroj Micard. Post la vizito, li opiniis ke la konstruaĵo tre taŭgas : oni povus facile transformi ĝin por kolektiva uzo. Do la aketo estis tuj decidita. Papero estis subskribita de la posedanto, Sro Micard kaj Sro Philippe ĉirkaŭ botelo de bona vino. Oni rendevuis ĉe notario por la lastaj formalizaĵoj. Sed subite, kelkajn tagojn antaŭ la oficiala vendo, unu el la posedantoj simple rifuzis, pro tute ne klaraj kaŭzoj, vendi la domon al la asocio. Nova malsukceso.

Sed intertempe okazis la Somera Lernejo en Houlgate. Micard ne plu estis sola en sia vilaĝo. Li kontaktis aliajn esperantistojn. La statutoj de nova asocio estis pretigitaj, kies lega naskiĝo okazis en Parizo la 16-an de Septembro 1951.

SEKVO TA

(1) « Malnovaj frankoj » (antaŭ 1960).

Esperanto tra la Mondo



LA U.E.A.-KONGRESO

1635 partoprenantoj el 49 landoj ĉeestis la 64an universalan kongreson de Esperanto, inter la 28a de Julio kaj la 4a de Aŭgusto, en Lucerno. Dum la solena inaŭguro, S-ro Robert Muller, sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, alparolis la kongresantojn, konkludante, inter alie, : « La nobla kaj viziista tasko, kiun vi prenis sur vin, estas nenio alia — longperspektive — ol starigi mondan demokration, specife pere de la uzo de lingvo universala ».

La nova statutprojekto de U.E.A. estis akceptita de la komitato. Inter alie, la estraro aprobis planon por malfermo de nova oficejo de Nov-Jorko, tute speciale por reprezentado de la Asocio ĉe U.N. La estraro ankaŭ decidis pri trakti, en la venonta universala kongreso en Stokholmo (2-9a de Aŭgusto 1980), la temon « Diskriminacio », kaj okazigi, krome, seminarion pri « Esperanto en enlandaj lingvaj problemoj ».

Dum la kongreso, oni akceptis aliĝetojn de du aliaj naciaj asocioj : Cilio kaj Portugalio.

Kiel kutime, okazis serio de tradiciaj kunvenoj kaj manifestacioj : fakaj kunvenoj, somera universitato, belartaj konkursoj, artaj kaj varietaj vesperoj, ekskursoj, infana kongreseto, diservo, k.t.p...

LA JUNULARA KONGRESO

La junulara kongreso de T.E.J.O. kunvenigis en Nederlando (20 — 27a de Julio) 317 gejunulojn el 30 landoj.

Samtempe, okazis seminario organizita de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de T.E.J.O. (K.E.R.) por neesperantistoj, financita helpe de la Eŭropa Junulara Fonduso kaj U.N.E.S.C.O.

Okaze de la kongreso, oni refoje aljuĝis la premion « Verko de la Jaro », ĉijare al « La granda kaldrono », la romano de John Francis.

Por 1980, oni antaŭvidas aranĝi la kongreson en Finnlando, en Rauma (25.7 — 1.8).

LA FERVOJISTAJ KONGRESOJ

Tiun jaron, la internacia kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj okazis en Turku (Finnlando). Ĝi arigis 359 partoprenantojn el 20 landoj.

Aperis terminareto por fervoja fako en Francio.

LA S.A.T.-KONGRESO EN SWANWICK

310 personoj el 16 landoj partoprenis la 52an kongreson de Sennacia Asocio Tutmonda, de la 13a ĝis la 20a de Julio en Swanwick (Britio).

En sia ĝenerala rezolucio, la kongreso, inter alie, protestis kontraŭ la neaplikado de la akto de Helsinko, kaj konstatis ke, ĝis nun, Esperanto estis malbone traktita en la Eŭropa Asembleo.

SPECIALA ATENTO POR LA ESPERANTO-KULTURO KAJ TEATRO

Dum la kongreso de Lucerno, okazis, sekve de invito de la prezidanto de U.E.A., S-ro Tonkin, kunveno de « Kultura Konsilio » pri la problemoj ligitaj al la esperanto-kulturo.

Oni provis plibonigi la libroservojn, eldoni la prelegojn de la Someraĵ Universitataj Kursoj, kaj de la Internacia Somera Universitato. Plie, dum la kongreso de Stokholmo, oni donos specialan atenton al la nun floranta teatra aktiveco. Tiurilate, oni ekscias ke nova esperanto-teatro ekaktivas en Leningrado.

RENKONTOJ EN GERMANUJO FINE DE LA JARO

Ni memorigas ke, de la 28a de Decembro ĝis la 4a de Januaro, okazos apud Würzburg, la tradicia Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo pri la temo « Eŭropo kaj la tria mondo ».

Paralele, disvolviĝos la « Internacia Festivalo » kiu celas junajn familiojn kaj homojn ĝis 50 jaroj (samloke, pri sama temo kaj kun distraj partoj).

NOVAJ ELDONAĴOJ

— « Praktika Bildvortaro de Esperanto », 96 paĝoj, publikigita de « Oxford University Press ». Vera mino de modernaj kaj praktikaj vortoj por la nuntempa Esperanto. Nepra havigo al vi tiun plaĉan kaj multkoloran vortaron.

— Reperis en Hungario la interesa « Gvidlibro por supera ekzameno » redaktita de Pechan, kaj al kiu kunlaboris grupeto de konataj kaj kompetentaj esperantistoj. Tri partoj en la 360 paĝoj : « Skizo de historio de internacia lingvo », « skizo de esperanta literaturhistorio », kaj « Metodiko ». La lasta parto, redaktita de Prof. I. Szerdahelyi, estas legenda por ĉiuj gvidantoj de kursoj.

— « Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto » de W. Auld. Kvin prelegoj de kompetentulo pri tiu temo.

— « Pri esperanto tradukarto » de Fernando de Diego. Ankaŭ prelegoj de la konata tradukinto de « Don Quijote ». F. de Diego ofte kontraŭstaras tradiciajn ideojn pri nia lingvo.

— « Asteriks » ankaŭ nun en la internacia lingvo ! Aĉetu tiun albumon. La mondfama gaŭlo ĝojos vin... kaj vi disponos pri nova pruvo de la moderneco de Esperanto por viaj amikoj, la ekspozicioj kaj la ĵurnalistoj.

— « Esperanto, une approche de la langue internationale ». Vere bonvena franclingva broŝuro por informado. Espreble, ĝi estos vaste uzata, 64 paĝoj.

— « Ĉiu ĉiun ». Verko autobiografia de aktiva pioniro de nia movado : Teo Jung, fondinto de « Heroldo de Esperanto ».

— « Leo Tolstoj » (la homo, la verkisto kaj la reformisto). La vivo de tiu famulo rakontita de franco, Victor Lebur (esperantisto) kiu iĝis, junulo, sekretario de la rusa verkisto.

LA RENASKIĜO DE LA MOVADO EN ĈINIO

Cina delegacio de ses membroj partoprenis la universalan kongreson de Esperanto en Lucerno. Inter ili troviĝis la famkonata verkisto kaj tradukisto Ye Junjian (Cicio Mar), laŭ « El Popola Ĉinio ».

Cetere, tiu revuo publikigas intervjuojn de alia verkisto, esperantisto, tre konata en la literaturaj rondoj internaciaj : Bakin.

En alia numero, aperis artikolo pri alia eminentulo esperantisto : Prof. Secenz, dekano de la fremdlingva fakultato de la Centra Cina Pedagogia Instituto.

Oni fondis Esperanto-Asocion en la provinco Hubei, restarigis grupojn en Suzhou, Wuhan, Shanghai, Chungking, ktp...

U.E.A. PREPARAS INTERNACIAJN KURSOJN

Post kelkaj monatoj, sekve de diskuto en la kongreso de Lucerno, Pola Esperanto-Asocio funkcigos internacian kurson por personoj kiuj ellernis la fundamentajn regulojn de la gramatiko. La kurso estos praktika. Tute aparte, oni funkcigos korespondajn kursojn por komencantoj surbaze de la angla, franca, germana, hispana kaj portugala lingvoj. Ili estos gvidataj sur diversaj kontinentoj.

George SAND

La 19a jarcento estis epoko de rapidaj kaj profundaj transformoj, tute unika en la historio de la homo. Dum tiu cento da jaroj, la civilizo pli evoluadis ol dum la antaŭa jarmilo. La teknikaj kaj sciencaj realigoj vere konfuzis la materialan vivon. Dum la lastaj jardekoj de la 18a jarcento la Franca Revolucio detruis la dekadeccantan feŭdan reĝimon. Super ties ruinoj rapide konstruiĝis nova ekonomia sistemo nomita « kapitalismo ».

Tio rezultis malaperon de la ĉiopotenco de la nobelaro kaj de la klerikaro, profite al nova klaso nomita « burĝaro », konsistanta el la elito de la « Tria-klaso ». Malŝelĉe, la eksceso de kapitalismo, la reakciaj tendencoj de malmalmodernaj monarkioj rapide naskis malfavorigatan klason, kiu ricevis la nomon « proletaro ». Tiu stato kaŭzis revoluciajn movadojn kiuj divastiĝis tra la tuta okcidenta Eŭropo.

Krom tio ekeestis intelekta elito dinamika kaj influa, ne nur el la privilegia klaso, sed ankaŭ el la popola medio. Neniu jarcento naskis tioman abundon de talentuloj kaj genioj sur la kampoj beletra, filozofia, kaj scienca. El ili unu virino rapide akiris eminentan lokon, kaj fariĝis la plej fama virino en Francio, eĉ en aliaj landoj. Tiu virino, George Sand (pr. : jorĝ san'), pro sia duobla origino, aristokrata kaj popola, sia malkvieta vivo, kaj sia diversa kaj fekunda literatura verkaro, reprezentas kaj simbolas maltrankvilan epokon, kies manifestiĝoj estis ofte kontraŭaj, sed tamen estis gravegaj por la tutmonda civilizo.

LA VIVO DE GEORGE SAND

Aŭrora Dupin (pr. : dŭpin') naskiĝis en Parizo la 1an de Julio 1804. Sia patro, Maŭrico Dupin provinca nobelo, estis elektinta la Revolucion. Li estis oficiro en la Respublika Armeo, kaj edziĝis kun virino el la popolo. Li mortis pro falo el sia ĉevalo kvar jarojn post la naskiĝo de Aŭrora. La infanino estis konfidita al la zorgado de sia patra avino, kiu loĝis en sia kastelo de Nohant (pr. : nohan') en la provinco Berry (pr. : beri') situanta je 300 kilometroj de Parizo. La patra avino ja ne povis malhelpi vizitojn de la knabineto al ŝia patrino avino. Sed, la du avinoj havis tute kontraŭajn temperamentojn. Tiu en Nohant fervoranta sian « nobelecon » plene restadis « malnov-reĝima ». Male la Parizanojn konfesis liberalegajn ideojn — eĉ rilate la tiaman epokon.

Tial, ekde sia plej juna infaneco, la knabino estis misedukita de du malaj ekstremaj sektarismoj. Tio, kaj ankaŭ ŝia duobla heredeco povas klarigi — almenaŭ parte — ŝian karakteron sendependan, malfacilan, lunatikan, kaj malobeeman. Fine ŝia avino decidis edukigi ŝin de renoma institucio « La Aŭgustenaj Sinjorinoj de Parizo » monaĥinoj de la ordeno Sankta-Aŭgusteno). Ŝi vivis tie de 1818 ĝis 1820. Pro la influo de la edukado de la monaĥinoj, Aŭrora travivis veran krizon de mistika religieco, kaj deklaris ke ŝi volas fariĝi monaĥino. Ŝia avino revenis ĝin al Nohant. Tie ŝi ekkonis junan nobelon, barono Kazimiro Dudevant (pr. : dŭdevan'), kaj edziniĝis kun li en 1821. Tiam ŝi estis deksep-jara. El tiu geedziĝo naskiĝis du gefiloj, Maŭrico fariĝanta unu el la plej bonaj kunlaborantoj de sia patrino, kaj Solanĝa.

Tamen, la harmonio inter la geedzoj ne longe daŭris. Kazimiro, kies temperamento estis materialista kaj ĝuema,

malfacile povis agordiĝi kun sia juna edzino idealema, latente mistikema, kaj iom stranga. Du jarojn poste, la juna virino enamiĝis kun juna talenta verkisto, Julio Sandeau (pr. : sando'). Siaflanke, Kazimiro ne estis senripoĉa. Tial, kunakorde la geedzo interkonsentis pri reciproka plena libereco, kaj amike disiĝis, ĉar la leĝo malpermesis eksedziĝon.



En 1831 Aŭrora Dudevant loĝis en Parizo kun Julio Sandeau. Tie, ŝi debutis sian beletran karieron publikante artikolojn en satira gazeto, « Figaro ». Kunlaboro kun sia amanto, ŝi publikis romanon titolitan : « Roza kaj Blanka » (virinaj nomoj), subskribitan « J. Sand », pseŭdonimo formita de la inicialo de la voknomo kaj la unua silabo de la nomo de la kunverkinto. La verko plene malsukcesis. La postan jaron la juna virino publikis romanon sen kunverkinto, kaj subskribis ĝin « George Sand » alprenante viran antaŭnomon « Georges » (Georgeo) foriginte la finan literon « s ». Tiu libro « Indiana » ricevis realan sukceson, kaj fariĝis bonan « lanĉilon » por la juna aŭtorino en la literaturan medion. Tion konfirmis ŝia dungiĝo en la redakcio de la fama « Revuo des deux Mondes » (Revuo de la du Mondo). De tiam George Sand estis akceptita en la literaturaj salonoj. Tie ŝi kontaktiĝis kun ĉiuj tiuepokaj famuloj. Ne longe poste, en 1833 ŝi disiĝis dis Julio Sandeau.

Ŝiaj multaj portretoj kaj fotografaj bildoj — el kiuj, kelkaj estis faritaj de Nadar la fama fotografisto — pravi-

gas ŝian reputacion de beletra virino, originala, iom lunatika, ofte surportanta virajn vestojn. Ŝi posedis evidentajn proprajn ĉarmojn kaj magnetismon. Ŝi havis skandaletajn amojn, ĝenerale mallongaj. Nedaŭra aventuro kun Prosper Mérimée estis sekvitata de pli longa litigeco kun Alfred de Musset (pr.: muse'), spite momentan forkuron de la juna virino kun gravuristo nomita Pagello dum vojaĝo al Venecio. Ŝi disigis dis Musset nur en 1835. Tiu aventuro riĉigis la literaturon per du romantikaj verkoj: « La Konfeso de ido de la Jarcento » de Alfred de Musset, kaj « Si kaj Li » far George Sand. Kompreneble ambaŭ donis al ŝi la bonan rolon en tiuj verkoj — kio estas tre homeca! Poste oni parolis pri amligo kun advokato, Michel de Bourges (Mihaelo el Bourges). En 1836 okazis leĝa separo de la geedzoj Dudevant, ĉar ekسدзго estis malpermesita. En 1838, George Sand ekvivis kun Chopin (pr.: ŝopin') la franca-pola fama komponisto. Ili restadis ioman tempon en la insulo Majorko por flegi tuberkulozon mortiganta la muzikistum dum lia 49a. jaro. La disigo de la geamantoj okazis en 1847.

Tiu periodo koincidas kun evidenta evoluo de George Sand. Probable pro la influo de la novaj liberalaj ideoj trafantaj eĉ la religiajn mediojn, ŝi aliĝis al socialismo kun la tuta vigleco de sia impetega karaktero. Ŝi eĉ fondis opozician gazeton « L'éclaireur » (la Skolto) kiu rapide fiaskis. La fina malsukceso de la revolucio de 1848 estis grava elreviĝo al ŝi. Ŝi forlasis politikon, kaj retiriĝis en sia kastelo de Nohant. Tie ŝi organizis « vesperojn » beletrajn, muzikajn, kaj artajn, kaj aranĝis teatreton en la kastelo. Ŝi elektis kiel « reĝisoron » la gravuriston Charles Manceau (pr.: ŝarl manso'), kaj ŝi amligiĝis al li ĝis ties forpaso en 1865.

LA VERKARO DE GEORGE SAND

Spite sian malkvietan vivon George Sand neniam ĉesis sian verkadon. Ŝia tre grava beletra verkaro estas tre videble influita de la eventoj mem de ŝia propra vivo. Ĝi estas klasigebla laŭ kvar diferencaj periodoj.

Laŭ kronologia ordo, la unua periodo de 1830 ĝis 1840 karakteriĝas de nobla idealismo kun mistika tendenco, kaj pliedado pro la emancipo de la virino, kiu tiam estis rigardata kiel « eterna neplenaĝulo ». La ĉefaj romanoj estas « Indiana », « Valentina », « Lilia »; ĉiuj estas virinaj nomoj.

La dua periodo, de 1840 ĝis 1853 estas impregnita de mistika socialismo, kaj predikas pri senklasa socio. Citindaj estas: « Le Compagnon du Tour de France » (la Kompano de la ĉirkaŭmigo ĉirkaŭ Francujo), « Consuelo » (Konsuela) ĝenerale apreciata kiel ŝia ĉefverko, « Le Meunier d'Angibault » (la Muelisto de Angibault).

En la posta periodo, koincidanta kun ŝia reveno al Nohant, ŝiaj romanoj temas la vilaĝan vivon kaj folkloron de la provinco Berry. Ili estas el ŝiaj plej belaj verkoj pro la freŝeco de la inspiro. La pli ŝatataj estas: « La Petite Fadette » (Eta Fadeta), « La Mare au Diable » (Lageto de la Diabolo), « François le Champi » (Francisko la Bastardo).

Fine, la kvara periodo de 1854 ĝis 1860 montras kolekton de sentimentalaj romanoj, tute laŭ la romantika maniero. La pli famaj estas « Le Marquis de Villemer » (Markizo de Vilmer) kaj « Jean de la Roche » (Johano de l'ŝtonego).

La beletra kreemo de George Sand ne estis elĉerpita de ŝiaj artikoloj en Parizaj revuoj, nek de ŝiaj romanoj. Ŝi ankaŭ provis la dramarton. Kuna relativa sukceso escepte de la teatraĵo « François le Champi » eltirita el la samnoma romano, ĉar ĝi havis pli ol cent prezentojn en Parizo.

En ŝia kastelo de Nohant, ŝi unue instaligis pupteatron, sur kiu tre videble troviĝas la daton de ĝia konstruo: 1847. Maŭrico, ŝia filo skluptis el tilia ligno, kaj pentris ĉarmoplenajn pupojn, kiujn George Sand lukse vestis. Tiuj marionetoj plenigas du grandajn vitro-ŝrankojn, kaj konsistigas miniaturan muzeon. Krom la klasikaj personoj, anĝeloj, demonoj, diablo, kampogardisto, ĝendarmoj, troviĝas ĉiuj tieepokaj tipoj, soldatoj, dandoj, mondomaj sinjorinoj, kaj multaj lokaltaj homoj. Krom sia reala arta valoro, tiuj pupoj estas aŭtentaj atestoj historiaj kaj folkloraj.


George Sand ankaŭ estis poetino. Oni ĵus eltrovis beletrajn kanzonojn verkita por ŝia teatro, inspiritaj de la provinca folkloro.

La romanistino mortis en ŝia kastelo dum ŝia 72a. jaro — escepta vivolongeco en tiu epoko. Ŝia forpaso afliktis ne nur ŝiajn geamikojn, sed ankaŭ la loĝantojn de Nohant kaj najbaraj vilaĝoj, kiuj donis al ŝi la ampleksan kromnomon « la bona Sinjorino de Nohant ». Kromnomo pravigita de ŝiaj boneco, vera kaj sincera afableco, profunda sento al la homaro substrekitaj de diskreta mistikismo. Ŝi ĉiam luktadis por la emancipo de la virino, kaj estis antaŭtempa feministino; ŝi estis obsedita de utopio: forigo de la socia partigo laŭ pli-malpli malamikaj klasoj, kaj alveno de vera homa harmonio.

Ŝia adoleska mistikemo reaperas en ŝia verkaro. Kelkaj esprimoj, aludoj aŭ subesprimajoj naskis tiun demandon en la menso de multaj admirantoj: « Ĉu George Sand estis incito? » Nenio ebligas aserti, ke ŝi estis asociita al aŭtenta inica societo agnoskita de la Granda Blanka Loĝio, aŭ ricevis veran aŭtentan ritan inicon. Sed evidentas, ke ŝiaj rilatoj kun la plej grandaj spiritoj de la 19a. jarcento, kiaj Victor Hugo, Honoré de Balzac kiu estis ano de la Rozo-Kruco, Barbey d'Aurevilly, kaj multaj aliaj, povis nur elvolviĝi kaj kleriĝi ŝian denaskan mistikismon. Cetere ĉu estas suzopeble, ke dum preskaŭ dek jaroj de intimo kun la rozkrucano Chopin, ne povis riveli al ŝi iajn sekretajn instruojn? Do, ŝajnas logike, ke George Sand povis akiri esoterajn konojn kvankam ŝi neniam aliĝis al tradicia inica societo.

Konkludante tiun koncizan eseon pri la vivo kaj verkaro de la genia romanistino, ni devas omaĝi al genulo, kies influo ludis konsiderindan rolan en tiu 19a. jarcento, transira epoko inter la feŭda socio kaj nia jarcento, transira epoko inter la feŭda socio kaj nia jarcento anoncanta kaj preparanta la zodiakan eraon de « Amforo » postvenanta post la erao de « la Fiŝoj ».

Eloi MOTILLON.



LEONARDO DE VINĈI KAJ LA BIKIKLO



La biciklo ! Vere mirinda objekto. Tre ŝparema transportilo. Sen fumo kaj senodoro. Postulanta la plej minimuman zorgon. Redonanta al la kruraj muskoloj tiom da energio kiom ĝi ricevas de ili.

Niaj plej modernaj duradiloj aspektas kiel veraj juveloj pro siaj delikataj trajtoj, siaj malpezeco kaj buntaj koloroj kaj metalrebriloj. Estas ne mirinde se, dank'al ili,

IOM DA HISTORIO

La praa biciklo aperis komence de la pasinta jarcento. Tiam ĝi aspektas iom ridinda. (Bildo 1). Tiu formo malrapide evoluis ĝis 1870 kun etaj ŝanĝoj kiel la pedaloj sur la frontrado. (bildoj 2 kaj 3). Samepoke aperas la velocipedo kun formoj pli malpli strangaj ĝis 1900. (bildoj 4, 5, 6, 7).

1818



1870

2




1870

3


ca

ca. 1870




4

1882




5

1900




6

ca. 1900



7




1900

8

oni povas, tra la plej diversaj regionoj, aldonante kilometrojn post kilometro, rondiri tutan landon. Sed por atingi tiun formon de plej alta grado de uzebleco, tiun preskaŭan perfektecon, la evoluprocezo trairis multajn stadiojn.


La teknikistoj vere hezitis inter ambaŭ formoj. Fine, en 1900, aperas la biciklo, kiun ni nuntempe konas. (bildo 8). De tiam la konceptado restas senŝanĝa, oni nur aldonas plibonigojn.

La manuskriptoprizorganto de la Ambrozia Biblioteko en Milano, iun tagon, sentis sian koron salti el sia brusto, dum lia spiro momente haltigis, kiam, okaze de restaŭrado, degluinte du paĝojn de la manuskripto de Leonardo de Vinci **Codex Atlanticus**, li mire ekvidas reprezentajn de biciklo aperi sur la dorsa flanko. Tie, dum kvar jarcentoj, tiu desegnaĵo mumie dormis kaŝite de ĉies rigardo. (bildo 9).



9

Lia miro estas memkomprenebla kiam oni konstatas, ke la genia florencano jam elpensis ilon, kiu estas multe pli proksima, rilate la teknikan flankon, al nia moderna formo ol al tiu de la pasinta jarcento. El la komparo ĉefe rimarkeblas tri elementoj.



La unua estas la samdiametraj du radoj. Certe la unua modelo de 1818 havis du tiajn radojn, sed la postaj velocipedoj aperas vere monstraj, laŭ la teknika aspekto. Kiamaniere oni povis surgimpri tiajn kamelaspektajn transportilojn? Kaj, tiun unuan taskon plenuminte, kiel oni povis stabile gardi firman iradon? Faloj kaj kolizioj tutcerte oftis.

Jen teksto, prenita el gazeto, de la por ni memorinda jaro 1887.

« Ĉiuj gazetoj de Bayonne (Bajon), unu post la alia, eĥis protestojn formulitajn de trankvilaj promenantoj kontraŭ la velocipedistaj ekzercaĵoj. La velocipedoj estas nun tiel perfektigitaj, ke ili senbrue radiras, tamen ne sen dolore rilate la personojn troviĝantajn sur ilia paso. Kaj

kiel ne troviĝi sur la irvojo de velocipedisto, kiam tiuj fuŝuloj arogante uzurpas ĉiujn aleojn de niaj promenejoj, precipe la Marajn Aleojn? Antaŭ du monatoj, unu el niaj amikoj, promenante kun sia familio, vidis unu el siaj bofratinetoj renversfalita fare de velocipedo senbrue veturinta de malantaŭ. Li tamen havis la ne esprimieblan konsoliĝon konstati ke la velocipedisto estas mezuranta la grundon, kaj restarigas kun la nazo en kaĉo. Sed tio mal multe kompensis la timon de la juna infano kaj ties difektitan vestaron... Neniu, nek la maljunuloj nek la dikventruloj, malamikis velocipedojn, maŝinetojn allogoplenajn se oni konsideras la nombron de ĝiaj amatoj, sed kondiĉe ke la velocipedistaj moŝtoj bonvolu sialoke radiri, surmeze de la vojo ».

La dua rimarkebla elemento trovebla en la biciklo de Leonardo estas la disigo inter la du funkcioj, la direkta kaj la movodona. La unua okazas je la frontrado, la dua je la postrado, kiel en niaj modernaj bicikloj. La velocipedoj, kun multaj hezitoj, konfuzis ambaŭ funkciojn en unu sama rado.

Fine, plej rimarkinda, estas la apero de la movodona mekanismo, kiu neniame videblas en la praaj bicikloj de la pasinta jarcento. Valoras detale studi tiun mekanismon.

Unue venas la dentrado, moviĝanta laŭ la pedalkuplo. Due, la artigigita rulĉeno, kiu transmis la movon al la tiucela rado. Oni facile povas vidi, ke sur tiu postrado troviĝas pli malgranda dentrado. La lasta elemento estas la malsimileco de diametro inter la du dentradoj, kio ebligas pli grandan rapidon, kaj postulas malpli da fortoimpulso. Kiel bedaŭrinde, ke la pasintjarcentaj teknikistoj ne konsis tiun desegnaĵon de Leonardo! Ili estus ŝparintaj multe da mistrakitaj inventaĵoj, kaj ili estus povintaj tiuj produkti celtaŭgan duradilon, anstataŭ tiujn sociajn amuzilojn por plenkreskuloj.



10

HAZARDA KAŜITAJO

Kiel jam menciite, niaj modernaj teknikistoj ne povis vidi la dum kvar jarcentoj kaŝitan desegnaĵon. Post la forpaso de la Florencano, Pompeo Leoni aliguis la disajn papfoliojn de Leonardo sur grandformatajn paĝojn de albumo. Kiam ambaŭ flankoj surhavis skribaĵojn de Leonardo, la kolektanto ĉirkaŭtendis truon tra la albuma folio, por ebligi ambaŭflankan legadon de la manuskripto. Kiam la dorsa flanko ŝajnis al li ne interesa, aŭ senskriba, li simple algluis la tutan folion. Tio okazis kun la 48a, a kaj b folioj, sur kies dorsa flanko troviĝas la desegnaĵo de la biciklo. Lasttempe, antaŭ kelkaj jardekoj, okaze de restaŭrado de la manuskripto de **Codex Atlanticus**, oni remetis sub lumon tiun strangan mekanismon.

ENIGMA DESEGNAJO


Tamen, eĉ se la samtempuloj de Leonardo estus vidintaj tiun desegnaĵon, verdire ili ne estus povintaj ĝin kompreni, ĝin enkaptigi. Ĝi estus por ili terure komplika strangaĵo, absoluta absurdaĵo. La tro enigma reprezentita ilo estus por ili tro ekster la kadroj de iliaj kutimaj konceptoj. Kiel moviĝi pere de tiu ilo ? Ĉu eĉ ĝi estas moviĝebla ? Ĉu ĝi estas ilo, aŭ simpla fantazio ? Temas ne pri la teoria movo surloke pere de aro da mekanismoj, sed pri vera movo en la spaco. La problemo estas tiu de dinamika ekvilibro inter pluraj kontraŭaj fortoj. Do vera problemo, kaprompiga komplikajo, kiu bezonas tutan teorion de dinamiko, kaj aron da adaptitaj konceptoj por klarigi la ekvilibron de moviĝanta sistemo.

Tiu situacio estas konstanta en la historio de la sciencoj (ekzemple elektraj fenomenoj, agnosko de la fosilaj restaĵoj), ankaŭ en la historio de teknikoj (ekz. la mikroskopo). Oni povas plene kompreni teknikajn inventaĵojn aŭ sciencan eltrovaĵon nur kiam oni disponas pri teorio, kiu ebligas komprenon, interpretadon de la nova fenomeno. Kiam mankas la teorio, la koncepta kadro, tiam la homoj tutsimple ne vidas la realan flankon de la konkretaj aĵoj, kiuj aperas antaŭ ili. En epistemologio oni nomas tion : koncepta blindeco.

CU AŬTENTIKA LEONARDAJO ?

Pro ĉio-ĉi — supre dirita, multaj fakuloj dubis pri la aŭtentikeco de la desegnaĵo. Ĝi estas tiel evidente proksima al niaj modernaj bicikloj, ke multaj historiistoj de tekniko taksas ĝin anakronismo. Tiu, laŭ ili, estas falsigita dokumento, kiun ni ŝuldas al lerta trompanto. Ĉu tiu opinio estas prudenta ? Kompreneble tiun hipotezon neniam oni povas forpeli, kiam temas pri historiaĵoj, precipe rilate manuskriptojn. Ĉu vere Leonardo desegnis ĝin ? Tri elementoj almenaŭ starigas dubon.

— La desegnomaniere montriĝas vere mallerta. Se oni komparas ĝin kun la zorge artaj grafikaĵoj de Leonardo, la dubo ne povas ne manifestiĝi. Tie la desegno estas iom infaneca. (Bildo 11)



— Leonardo kutimas klarigi la desegnon pere de skribaj aldonoj. Estas ĉiam respondilaroj inter desegno kaj skribo, unu kaj alia interplektiĝas laŭ formoj por ni vere modernaj. Notinde estas, ke en la manuskriptoj de Leonardo ĉiam aperas la t.n. spegula skribo. Tie la desegnaĵo nudas.

— Se oni atente rigardas la desegnaĵon (bildo 9), stranga afero aperas. La bildo montras teknikajn malebla-

ĵon, kio forte kontribuas al ĝia « malleonardiĝo ». La pedal-kuplo estas pli granda ol la horizontala kontakto de la du radoj. Tutsimple tio signifas ke tiaj pedaloj malebligas pedaladon ; sed tio signifas ankaŭ, ke Leonardo, kiu havis teknikajn senton ĝis maksimuma grado, ne povis preteratenti jenajn fantazian monstرون.

TAMEN LEONARDECA !

Sur la antaŭa flanko de la folio, sur kies dorsa kusaĵas la biciklo, estas desegnitaj pormilitaj instalaĵoj kun multaj klarigoj laŭ la tipa skribmaniero de Leonardo (Bildo 10). Do, eĉ se la desegnaĵo de la biciklo venas de la Florencano, tamen la paperfolio estas vere aŭtentika.

Aliflanke, kiel jam dirite, la fakto ke tiu paperfolio estis algluita en la ĵaroj tuj post la morto de Leonardo, ebligas hipotezi pri la 400 jara faraoneca protektado kontraŭ falsigisto. Cetere tiu eventuala falsigisto devus esti sufiĉe moderna, ĉirkaŭ 1900, kaj iom infaneca : vera (!) falsigisto estas imitinta Leonardon kiel eble plej. Sed kiamaniere manon meti sur manuskriptojn tiel pie konservataj ?

Fine, sub la biciklo videblas maldecaj desegnaĵoj, tiaj kiaj la junuloj faras en la lernejoj necesejoj (temas pri reprezentadoj de homaj penisoj iom simbolformitaj, kaj en pozicio ne duba !). Tie ankaŭ aperas la vorto **Salai**. Tiu estis la nomo de pigra kaj petolanta, juna dungito-modelo-learnanto de Leonardo.

DETEKTIVA SOLVO

Kiel do interpreti tion ? En la ateliero de Leonardo, ĉiam kaj ĉie, estas paperfolioj dismetitaj kaj ĉiam servopretaj. La majstro kutimas tuj ĵeti sur paperon la fuĝeman ideon, kiu ĵus plenisĝis lian senlancan menson. Dum lia foresto la junuloj, kiuj venas lerni la diversajn artojn, kiel musoj en foresto de kato, profitas la okazon por malstreĉi la disciplinon. Tiam unu primokas sian kamaradon sur la sama papero, kiu jam estis ricevinta la malneton, la mallertan provon kopii la desegnaĵon kiun la majstro estis krajoninta. Ĉu la infana kopio de la biciklo venas post kiam Leonardo jam estis pleninginta la alian flankon de la folio (aŭ antaŭ) ? La afero ne gravas, oni nur sciu, ke la papero, sufiĉe kosta, estis zorge ŝparata en tiu epoko. Oni tiam komprenas, kial sur unu flanko estas la seriozaĵoj de Leonardo, kial sur la dorsa troveblas la fantaziaj malprudentaj de junaj petoluloj kune kun la mallerta kopio de genia transportilo.

Eblas tamen revu. Se tiu flanko de la manuskripto ne estis malaperinta dum kvar jarcentoj, eble Sekspiro aŭ Kartezio, Voltero aŭ Katarina la Granda estus povintaj bicikli. Necesas ankaŭ emfazi la genian kapablon de Leonardo de Vinĉi, kiu jarcentojn antaŭ la plenefektiviĝo de konkretaj iloj, jam kapablis pere de sia menso, koncepti kaj antaŭvidi ilian efektivigon.

Roberto LLOANCY.

BIBLIOGRAFIO :

- 1) Léonard de Vinci L'humaniste — L'artiste — L'inventeur, Ladislao RETI R. LAFFONT PARIS 1974.
- 2) Kulturrat Kajeroj 1977/2.

ESTAS NENIU RAJT' SEN DEVO - LA DEVOJ DE LA HOMO

En Esperanto, la traduko de la revolucia kanto :

« La Internacio » tradukeblas per :
Neniu estas rajt' sen devo
Neniu devo sen rajt' »

Mi deziris uzi la unuan version kiel temon de mia priensido rilate al la devoj de la homoj, sed iuj plendis pri la malklareco de la esprimo; kiam « neniu » estas apartigita de ĝia substantivo, ĝi ŝajnas kvazaŭnomo reprezentanta personon... kaj mi fine rezignis pri laŭvorta citajo por konservi nur la ideon. Kiu ideo? La nepra ligiteco de la rajtoj kun la devoj, kiun oni ĝenerale forgesas, kiam oni nur aludas pri la rajtoj, kiel okazas en diversaj cirkonstancoj pri kiuj temos poste.

Car 1978 estis la 30a datreveno de la deklaracio de 1948, mi uzos tiun dokumenton por pristudi, tra la deklaritaj rajtoj, la universalaj devoj de la homoj. En la unua parto, mi provos montri, kiuj devoj fontas el la proklamitaj rajtoj.

Kial estas Universala deklaracio de Homaj Rajtoj?

Kio estas rajto? Pri tiu vorto okazas multaj miskomprenoj. En la 18-a jarcento, oni deklaris, ke la rajtoj de la homoj estas « naturaj » (la naturo, tiam, estis laŭmoda), sed tiu apudeco inter rajto kaj naturo ŝajnas al mi eraria. Fakte, rajto estas permeso, kiu fontas el la socio, kiun garantias leĝo, kaj kies plenumon oni povas peti de tribunalo. La rajtoj estas juraj estaĵoj, sed tute ne naturaj. Necesas distingi la permeson de la ebligigo; kiam temas pri « natura leĝo », ekzemple rilato inter fizikaj fenomenoj, tiam, la ekzisto de iuj rilatoj ebligas la plenumon de iu ago; ekzemple, la denseco de ligno ebligas la konstruon de flusiloj. Kontraŭe, la rajtoj en socio donas nur permeson, tio signifas, ke la leĝo ne malebligas la agon, sed ne ebligas ĝin. Spite al la rajto pri laboro, ekzistas en multaj landoj, multaj senlaboruloj. Skribi sur la muroj, ke ĉiu homo rajtas labori, ne kreas la postenojn.

Se la rajto estas socia, kaj eĉ jura aspekto de la vivo, tiam aperas la rilato inter rajto kaj devo. Ĉiufoje kiam iu leĝo permesas ion al iu, ĝi samtempe malpermesas al la aliaj malebligigi la permesitan agon. Ekzemple, se saniga reglamento permesas al loĝantoj de iu ĉambro spiri puran aeron, ĝi samtempe ordonas el la eventualaj fumantoj ne fumi, kaj tiu nefumado fariĝas devo, kies plenumo dependas eventuale de iu gardisto, kontrolisto, policisto...

Tiu lasta ekzemplo montras, ke laŭ la kazoj, oni povas apartigi diversajn rajtojn laŭ la respondiga devoj.

Pri kiuj devoj la socio povas agi? La klasado fontas el la rimedoj, kiuj ebligas, aŭ ne, la plenumon de tiuj devoj. Mi nomas moralaj, la devojn, kiujn la socio ne povas postuli de la civitanoj. Tiam, la socio agas per instigoj, admonoj, alvokoj, kaj la homoj esperas, ke la morala valoro de la « aliaj » ebligas la plenumon de tiuj devoj, kaj tiam ili povos ĝui pri siaj rajtoj.

Mi nomas materialaj la devojn, kiujn la socio povas postuli de la sociojanoj, helpe de policistoj, ĵuĝistoj, karceroj k.t.p.... Tiam, la civitano, kiu deziras profiti de siaj rajtoj, povas peti de tribunalo la rimedojn necesajn al la efektiviĝo de tiaj rajtoj.

Kiam okazas tiaj deklaracioj? Kial en 1948? Antaŭ 1948, jam ekzistis similaj deklaracioj, ekzemple okaze de la sendependeco de la eksbritaj ekskolonioj de Ameriko en 1776, kaj ankaŭ en Francio en 1789. En tiuj kazoj, iuj

homoj ne havis la samajn rajtojn kiel la aliaj; ekzemple, en la tiama franca monarkio, la burĝoj, eĉ riĉaj kaj ekonomie potencaj, ne havis la rajtojn de la nobeloj, kaj tiuj specialaj rajtoj por kelkaj homoj estis taksataj privilegioj. Por ŝanĝi la juran situacion, necesis revolucio, kaj la asembleo, kiu kaptis la politikan povon, poste proklamis la deklaracion pri la homaj rajtoj. Oni facile komprenos tiun nebran evoluon, se oni konsideras, ke en la antaŭa reĝimo, kie mankis la rajtoj, ankaŭ la rajto sin esprimi mankis; oni povas kaŝe dissendi flugfoliojn, sed la oficialaj deklaraj aperas nur post la kapto de politika povo.

En tiaj cirkonstancoj, la oficialaj deklaracioj estas nur principoj, kies celo estas pravigi la novajn leĝojn, doni juran bazon, kaj ŝajne racian kriterion por konfuzige kredigi, ke tiuj sociaj leĝoj estas « naturaj », kaj sekve « justaj ».

Kial la « universala » deklaracio pri homaj rajtoj okazis en 1948? Por bone kompreni la situacion, oni devas konsideri, ke ĵus finiĝis la dua mondmilito. Dum tiu milito, la eŭropaj ŝtatoj, kiuj fondis koloniojn en la fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcentoj, sin detruis reciproke. Post la milito, restis nur du grandaj politikaj regnoj: Usono kaj Sovetio, kiuj laŭ jura vidpunkto ne posedis koloniojn. Kiam fondiĝis en 1945 la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj, tiam aliĝis ekskolonioj, kiuj jam sendependiĝis okaze de la milito. Tiam, la deklaracio estis invito al ĝeneralo de tia sendependeco de la aziaj kaj afrikaj kolonioj, kaj tial, ekzemple la tiama Franca registaro, kiu batalis por konservi koloniojn, rifuzis ratifiki tiun deklaracion. Oni ankaŭ povas rimarki, ke en diversaj punktoj, tiu deklaracio tre forte neas la principojn de la ĵus venkita regnoj: Italio, Japanio, kaj ĉefe la Hitlera Germanio.

Analizo de la Deklaracio pri Homaj rajtoj de 1948.

Klasado de la rajtoj kaj devoj. Kiam oni pensas pri la devoj, kiuj necesas por efektiviĝi la rajtojn deklaritajn, tiam oni facile distingas la jenajn kategoriojn. Iuj rajtoj estas garantiataj de tribunaloj, la leĝoj jam ekzistas, sed ne estas ĉiam, kaj ĉie aplikataj, tial la devo kuŝas antaŭ la juraj instancoj de la diversaj ŝtatoj. En aliaj kazoj, la leĝoj ankoraŭ ne ekzistas, tiam la devo rilatas al la leĝfarantoj de la ŝtatoj, tio estas al la politika povo. Oni ankaŭ povas renkonti iujn « ekonomiajn » rajtojn, kies plenumo, en la nuna socio estas pure utopia, sed kiuj permesas pli bone analizi, kio estas rajto. Fine, mi aludas pri la « moralaj » rajtoj, kies plenumo estas nur teoria, krom se oni « kredas » pri la « bono » de la homo.

La juraj aspektoj de la deklaracio. La baza aspekto de tiu jura parto kuŝas en la unuaj artikoloj de la deklaracio, kaj la baza principo estas, ke ĉiuj homoj estas **jure** egalaj. Oni trovas konsiliojn tiuflanke en la art. 2 kaj 7, kiuj asertas, ke ne devas esti diskriminacio en la leĝoj. La art. 4 malpermesas la ekziston de specialaj statusoj: sklavoj, servutoj..., kaj en la art. 6 oni konkludas: ĉiuj homoj estas jure personoj.

Por iuj ŝtatoj, tiu parto pri jura egaleco de la homoj havas politikan signifon, ĉar oni devas prepari novajn leĝojn, sed plejofte, tiuj rajtoj kuŝas jam en la leĝaro, tial la teksto estas alvoko al la policistoj kaj ĵuĝistoj, por ke ili apliku la leĝojn.

La deklaracio ankoraŭ pli detale priskribas la devojn de ĵuĝistoj kaj policistoj en la sekvantaj artikoloj:

— Art. 8: La tribunaloj devas riparigi la atencojn al la homaj rajtoj.

- Art. 11: La tribunaloj devas pruvi la kulpecon antaŭ ol kondamni.
- Art. 12: La tribunaloj devas protekti la privatan vivon.
- Art. 13 kaj 20: La tribunaloj ne devas puni homojn pro:
 - transloĝigo en aŭ ekster la ŝtato
 - kreado de pacema asocio.
- Art. 16: La leĝaro devas establi egalecon inter la geedzoj.

Kompreneble, se principe tiuj devoj estas evidentaj por la plenumo de la homaj rajtoj, tamen, en la reala vivo, oni povas sin demandi, kiu estas la kriterio de « pacema » asocio? Iu asocio povas celi pacon mortigante la duonon de la popolo, ĉu tiam oni povas nomi ĝin pacema?

La ekonomiaj aspektoj de la deklaracio. Pri tiuj « rajtoj », la situacio ŝajnas al mi paradoksa. Iuj, nekonatuloj, proklamas, ke « ĉiuj rajtas posedi... » iom », sed, kompreneble, tiuj nekonatuloj ne ebligas tiun posendon. Tial la deklaracio ŝajnas al mi tre danĝera, ĉar ĝi prezentas utopiojn kvazaŭ tiuj realigebajn, forgesante nur precizigi la nomon de la « dio » kiu ebligas la plenumon de tiuj rajtoj. Laŭ mia vidpunkto, oni devus klarigi al la homoj, ke ne temas pri « rajto » posedi ĉion, sed pri rajto je justa divido de tio, kiu fakte ekzistas. Oni povas opinii, ke la kunekzisto de riĉuloj kaj mizeruloj estas netolerable, laŭ justa vidpunkto, sed tio ne permesas proklami la « rajton » por ĉiuj esti riĉaj. En la teksto, oni povas trovi:

- Art. 17: « proprieto ne devas esti arbitre forprenita... » sed kio signifas « arbitre »? kiu estas la kriterio de arbitreco? Denove temas pri devo por la juĝistoj, ne obeli al la potenculoj.
- Art. 22 kaj 27: rajto je socia asekuro, disvolvigo de la persono.
- Art. 23, 24 kaj 25: rajto je laboro kaj sufiĉa salajro.

Oni povas sin demandi, kiam salajro estas « sufiĉa », kaj kiuj pagos la elspezojn por socia asekuro kaj disvolvigo de la persono? Ĉar la devoj ne estas precize difinitaj, tial mi opinias, ke tiuj rajtoj estas nur utopioj por trankviligi la ribelantojn.

La politikaj aspektoj. Ĉar la venkintoj de la jusa milito proklamis sin demokratoj, tial la politikaj artikoloj pri rajtoj, tute simple deklaras, ke nur okcidente demokrata sistemo taŭgas. Ŝajnas, ke pri tiu punkto, la « rajtoj » de la homoj estas tre limigitaj, fakte, la deklaracio trudas la okcidentan sistemon al ĉiuj homoj « ĉar tio estas bona por ili... » kiel oni diras al infanoj « kiuj estas tro junaj por kompreni ». Fakte, mi notis en la dokumento:

- Art. 14: Kiu pekas kontraŭ O.U.N., tiu ne plu respektindas.
- Art. 21: Oni nepre devas praktiki la universalan baloton.
- Art. 20: Nur la pacemaj asocioj estas akcepteblaj.
- Art. 30: Neniu rajtas detrui la rajtojn kaj liberecojn difinitajn... kio signifas, ke la teksto de 1948 deklaras sin perfekta, netuŝebla, tabua!

La moralaj aspektoj. La unua artikolo estas tipo de utopia moto, kiu povas efiki nur kiel balzamo por doloroj, ĝi estas iu speco de la fama opio por la popoloj. La homoj devas kondukti fratece!!

En aliaj artikoloj, pli precizaj, aperas moralaj problemoj pro la kontraŭeco de diversaj devoj. Ekzemple, oni devigas la homojn ĝenerale, kaj la juĝistoj kaj policoj estas homoj: respekti la vivon, la liberecon, la sekurecon de la aliaj (art. 3). Sed la juĝistoj kaj policoj mortigas, enkarcerigas, kaj minimume timigas la kulpulojn, kaj eventuale la kulpintojn. Ĉu tiuj homoj ne estas « la aliaj »?

- Art. 9: oni ne devas arbitre ekzili. Kiam tribunalo enkarcerigas homon, kiu povas certe aserti, ke tiu decido ne estas arbitra ekzilo?
- Art. 10: la juĝistoj devas esti senpartiaj. Tio estas facile direbla, sed eĉ kiam juĝisto opinias, ke li juĝas nur laŭ sia konscienco, kio pravas, ke tiu konscienco ne estas la rezulto de longa pacienca laboro de « partio », kiu, iel, kondiĉis tiun konsciencan? Kaj kion opinii pri la senpartieco de popola juĝantaro?

Mi jam aludis pri la « ekonomiaj rajtoj », se oni forpelas la utopiajn aspektojn, restas iu morala devo: « juste dispartigi la havaĵojn ».

Kaj fine oni atingas la plej kernajn devojn de homo, kiuj, laŭ mi estas nepraj bazoj por ĉio cetera:

— La devo akcepti la diversajn opiniojn, kiu kuŝas en la art. 18. Tiu devo, kiun oni nomis « toleremo » jam en la 18-a jarcento, estas laŭ mi la plej ĉefa, ĝi povas respondi al la utopia frateco, kondiĉe, ke oni uzu la esprimon: « akceptemo » anstataŭ: « toleremo ». Oni tuj sentas la nuancon, kiam oni klarigas, ke oni devas toleri la ekziston de malamiko, kiujn oni ne povas detrui, dum oni akceptas la malsimilajn karakterojn de amiko, kun kiuj oni vivas.

— La art. 19 montras la devon pri informado, por la informantoj (jurnalisto, verkisto, instruisto...), la devo estas « honeste » informi: por la aliaj, la devo estas « honeste » informiĝi. Kompreneble, oni povas diskuti pri la signifo de « honeste », sed mi deziras substreki la gravan valoron de informado: ĝis estas kondiĉo por ĉiuj aliaj rajtoj.

— Fine venas la devo « bone » eduki la infanojn (art. 26). La artikolo diras, ke la gepatroj rajtas... tio liberigas la gepatrojn rilate al ŝtato, eklezio k.t.p., sed kio: liberigas la infanon mem de ĉiuj gepatroj? Tio estus temo por tuta preleco, sed ĝi estas ekstera al la hodiaŭa, tial mi ne detale ĝin studos.

Mi provis analizi la tekston de 1948, kun du kriterioj: kiuj estis la historiaj kondiĉoj, kiam oni decidis pri la teksto: kaj kiuj estas la praktikaj rimedoj, kiuj permesas esperi pri respektado de tiuj proklamitaj rajtoj. Estas multaj problemoj pri kiuj oni povas detale diskuti, sed se oni deziras elekti la plej gravajn konkludojn, ili aspektas al mi jenaj. Al ĉiu « rajto » respondas « devo ». Grandparte, tiuj devoj estas profesiaj: la juĝistoj, la policoj, la informantoj, la edukistoj nepre devas kondukti laŭ la regularo, kiu, dank' al taŭga konduto de la profesiaj respondeculoj, permesas la plenumon de la homaj rajtoj. Pri la « ordinara homo », la devoj estas duobla: kiel voĉdonanto, ero de la politika vivo la civitano devas zori por ke la leĝoj de la ŝtato ebligu la respekton de la iura personeco por ĉiu homo, kaj ke la leĝoj ornamu kiel eble plej justan dispartigon de la riĉaĵoj. Aliflanke, en la ĉiutaga morala vivo, la socio devas unue ne ĉeni la aliajn, kaj due, laŭnove, post bona informiĝo, akcepti la diversecon de la opinioj.

VESPESMANĜO KUN TEODORO SCHWARZ

Bernard Golden

La vesperon de la 11-a de marto, antaŭ precize 12 jaroj, mi elvagoniĝis ĉe la metrostacio de la 116-a strato en la okcidenta parto de la urbo Nov-Jorko. Rapide suprengriminte la ŝtuparon al la strato, mi piediris en la direkto al Riverside Drive. Mi haltis nur momente por ĵeti nostalgian rigardon al la Universitato Columbia, kie mi pasigis plurajn jarojn kiel studento. Poste, daŭrigante mian vojon norden, mi serĉis adreson skribitan sur paperslipo en mia mano. La anticipe de la vespermanĝo, kiu atendas min, venigis akvon en la buŝon. Ne temis pri ordinara usona manĝo, sed pri hungara.

Post kelkaj minutoj, mi atingis la serĉatan loĝdomon kaj facile trovis la apartamenton de miaj gastigantoj. Premante la puŝbutonon de la sonorilo, mi legis la apudan nomplaton : Teodoro Schwarz / Tivadar Soros. Jes, mia unua sperto kun la hungara kuirarto estis en la hejmo de unu el la plej eminentaj hungaraj esperantistoj, kiu tiam loĝis en Nov-Jorko. Mi konatiĝis kun li en la jaro 1967 en la kunveno de la novjorka Esperanto-grupo. Tiutempe mi jam ne estis daŭra loĝanto en tiu urbo, sed troviĝis en la metropolo nur provizore, post kvarjara restado en Eŭropo kaj antaŭ nova vojaĝo al Afriko. Unufojon semajne malgranda aro da fervoraj verdstelanaj kunvenis en la informo-centro de ELNA /Esperanto-Ligo por Norda Ameriko/ por konversaci en Esperanto. Frekventis tiujn kunvenojn konataj esperantistoj kiel Mark Starr, nuntempe honora membro de UEA, Ralph Bonesper, mondfama membro de SAT, kaj ankaŭ Teodoro Schwarz.

Antaŭ ol daŭrigi mian rakonton, mi devus klarigi, ke en la historio de la Esperanto-movado rolis du ŝvarcoj : unu estis la franca humoristo, poeto kaj kabared-fondinto, Raymond Schwartz ; la alia estis la hungaro Teodoro Schwarz. Notu, ke unu el la ŝvarcaj familiaj nomoj finiĝas per -tz, dum la alia havas nur -z. Teodoro Schwarz estis konata en Esperantujo ankaŭ laŭ la esperantigita formo de sia nomo, Teodoro Svarc, kaj krome laŭ sia hungara nomo Tivadar Soros. Ne nur ilia esperantisteco kaj komuna familia nomo ligas tiujn ĉi du homojn ; ambaŭ ankaŭ naskiĝis en la sama jaro : 1894.

La vivhistorio de Raymond Schwartz estas tre bone konata, do mi ne devas detale pritrakti ĝin tie ĉi. Kiu volas scii la ĉefajn detalojn, legu la broŝuron **Raymond Schwartz, lia vivo kaj verkaro** de Roger Bernard. Male, estas tre malfacile trovi donitaĵojn pri la tuta vivhistorio de Teodoro Schwarz. En konsultlibroj pri la historio de la Esperanto-movado, malabundas informoj pri li. Ekzemple, **Enciklopedio de Esperanto**, eldonita en la hejmurbo de Schwarz, dediĉas nur kvin liniojn al li. **Esperanto en Perspektivo** estas malpli avara kaj mencias lin per entute sep linioj. Li esperantistiĝis antaŭ la unua mondmilito kaj fariĝis milit-

kaptito en Rusio. Post sia reveno al Hungario, li laboris profesie kiel advokato en Budapeŝto.

Li komencis agadi en la hungara Esperanto-movado en la fruaj 1920-aj jaroj, kune kun tri aliaj tridekjaruloj, kiuj same kiel li, lernis Esperanton antaŭ la milito : Julio Baghy, ankaŭ militkaptito en Siberio, Kolomano Kalocsay kaj Paŭlo Balkányi. En 1922 Teodoro Schwarz, per sia financa subteno, iniciatis la eldonon de la plej altkvalita beletra revuo en Esperanto, **Literatura Mondo**. Li ne nur administris ĝin, sed ankaŭ kontribuis literaturajojn sub la pseŭdonimo Teo Melas. Pro manko de sufiĉe da abonantoj, la periodaĵo de Schwarz daŭris nur kvar jarojn. Du fojojn poste oni provis revivigi **Literatura Mondo**, sed pro malfavoraj mondaj eventoj, la publikigo denove ĉesis. La ĉefa libroforma verko de Teodoro Schwarz en tiu periodo estas **Modernaj Robinzonoj /1924/**, en kiu la aŭtoro rakontas siajn rememorojn pri la fuĝado de militkaptitoj en siberia praarbo fine de la unua mondmilito.

Nun ni reiru al la novjorka loĝejo de ges-roj Schwarz, kie mi staris atendante antaŭ la pordo. S-ro Schwarz enkondukis min en la loĝejon kaj prezentis min al sia edzino. Mi rimarkis, ke la tablo en la manĝotamboro jam estis primitita, kaj miaj gastigantoj ŝajnis iom ĝenataj. Mi pensis, ke mi eble eraris pri la horo kaj demandis, ĉu mi malfruis ?

« Ne, tute ne. Tio ne estas la problemo », diris s-ro Schwarz.

Poste, lia edzino klarigis, ke ŝia forgesema edzo ne memoris, kiam li invitis min vespermanĝi kun ili hodiaŭ, ke li jam akiris biletojn por la ĉi-vespera opera prezentado.

« Sed ne gravas. La vespermanĝo estas preta. Ni manĝos, kaŝtrinkos kaj ĉe havos iom da tempo por babili antaŭ ol ni devos foriri ». Tiel Teodoro Schwarz bonhumore traktis la situacion. Post la bongusta vespermanĝo, li donacis al mi ekzempleron de sia plej lasta verko.

Ni kune malsupreniris al la strato, kaj ges-roj Schwarz adiaŭis min el taksio, kiu veturigis ilin al la operejo. Mi iris hejmen per la subtera fervojo kaj jam en la vagono mi komencis trafolumi la donacitan libron, **Maskerado ĉirkaŭ la morto /1965/**. Ĝia subtitolo, **Nazimondo en Hungarujo**, koncize karakterizas la enhavon ; temas pri aŭtobiografia romano priskribanta la travivaĵojn de judo en Budapeŝto dum la dua mondmilito. Per ingenia elturniĝo, Teodoro Schwarz kaj lia familio sukcesis transvivi nekredeblajn teruraĵojn.

Post tiu neforgesebla tago, mi renkontis Teodoron Schwarz de tempo al tempo okaze de Esperanto-kunvenoj en Nov-Jorko ĝis la fino de 1967, kiam mi forveturis. La sekvan jaron li mortis.

Bernard GOLDEN
Hungario

BALADO PRI ROALD AMUNDSEN

Nokte de 24-25 Majo 1928, la mondo estis maltrankviligita de ekscio pri polusa tragedio de Nobile. Lia direktebla balono « Italia » pereis apud Spicbergen.

En porsava operacio partoprenis 22 aviadiloj kaj 18 ŝipoj.

Antaŭ ĉiuj, sin direktis al loko de la katastrofo norvego Larsen. La sveda piloto Lundberg trovis grupon de Nobile, li ĵetis al viktimoj varmajn vestojn, nutraĵojn kaj poste liveris grave vunditan Nobile al naĝanta bazo « Citta-di-Milano ». Grupo de vundita Malmgren estis trovita de rusa piloto Cuŝinovskij kaj savita de ŝipo « Krasin ».

Sed ne estis trovita grupo de Alessandri. Tial, Roald Amundsen, ĉiam sindonema, ĉiam preta, sin ĵetis en vojon, decidis serĉi la viktimojn de Polu-

so. Li flugis sur la franca aviadilo « Latam », akompanata de sia amiko Ditrhnsen, kaj de francaj aviadistoj Gilles, Vallet, Brazy, De kuvervil.

18 — 6, ili forflugis kaj ne revenis...

Ses semajnojn daŭris la serĉado. Ili pereis. Kiel tio okazis ? Neniu scias...

Pri Amundsen, la fama esploristo de la arktaĵaj landoj, kiu unua atingis la Sudan Poluson, lia eminenta sampatriano Fritjof Nansen diris : « En li vivis ia eksplodema forto. Sur la nebula firmamento de norvega popolo, li ascendis per radiant-stelo ».

Malĝoja estas perejo de Amundsen kaj de liaj sin-ofertintaj amikoj, sed per heroe bela morto finiĝis ilia vivo !

El Nord' kirloventa
Al homoj de l'mondo
Alvenis alarmo
fatala :
Rompiĝis, pereis
Nobile-balon'
Febila, fragila
« Italia »...

Tuj Amundsen flugis
Sur franca « Latam »,
Por savi kolegojn
ĉifoje.
Sed baldaŭ la mondon
Konsternis la fam' :
« Latam », malaperis
survoje...

Venkinto de l'vasto,
De l'Suda Polus',
La homo de vol',
de kuraĝo !
Vin logis arkano
De nekonatec',
Vin vokis eventa
vojaĝo.

La ŝipoj eŭropaj
Kaj aviadiloj
Sin ĵetis, por savi
viktimojn.
Norvego kaj svedo
Kaj rusoj al « SOS » *
Revokis kaj savis
la « animojn »...

— Kio estas al vi ?
« Latam » « Latam » !
Demandis la ter'
emocia...
Sed en oceano
Radio-gam'
Ekĉesis pro spasma
glacia...

Teruraj obstakloj,
Baraĵoj sen fin'
Tempest-karuselo
senĉesa,
Sed por vi poluso
ja kvazaŭ destin',
Tiranta, amata,
impresa.

Nebule kaŝitaj
En neĝo, en mar',
Fariĝis por ĉiam
detaloj
De la eksplodinta
Sur la glaciara
Legenda kaj trista
« Italia »...

Pereis plej brava
Heroo de l'arkto,
Natur-esploristo
genia
Norvegoj plorpetis :
— « Ho serĉu Rualon !
Ho savu Rualon
nian ! »

Vi flugis el kara,
el blua fjord'
Kaj plu ne revenis
al domo...
Nun restis pri homo
En mond' rememoro
Kaj brila, eterna
renomo.

Sed restis — ho ve ! —
Netrovita grupoet',
Kaptita de ŝtormo
en foro...
Sciante pri tio,
La hom' de l'imnet'
Revokis per nobla
koro.

Sed mutis nebulo.
Nenia respond'.
La arkta dezerto
silentis.
Kaj mevoj forflugis
al la horizont'.
Kaj ŝajnis, — ne kriis —
lamentis...

Se kredi legendon —
La blanka mev' —
Anim' de marist'
pereinta...
Ho kiom da mevoj
En la ocean' !
Gloron al homo
Sin ofertinta !

Moskvo, 26-3-1978
Aleksandr LOGVIN

* « SOS » = « Save our souls » : « savu niajn animojn », radio-signalilo de plago. Pli frue ol aliaj, ĝin ekaŭdis radio-amatoro ŝmida el Arĥangeĥsk.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

Krucvortoj

	A	B	C	D	E	F	G	H
1	K	U	R	A	T	O	R	O
2	O	R	U	M	i		U	
3	M	A	N	i	P	U	L	i
4	E	N		K	O	R	A	L
5	D	i	G	O		O	D	O
6	i		U		A	G	O	J
7		A	M	E	M	A		
8	A	S	i	M	i	L	A	D

Horizontale :

- 1 — Juvelo en formo de plata skatolo.
- 2 — Parto de la inaj seksorganoj. Ofende.
- 3 — Mamulo kun longaj oreloj.
- 4 — Pli ol sufiĉe. Instrui beston.
- 5 — Radioaktiva elemento. Aŭdebla aervibrado.
- 6 — Infano (R). Malgranda (R). Azia trinkajo (R).
- 7 — Kaŭzanta morton (R). Veni returne (R).
- 8 — Tuto necesa por labori (R). Guto de saleca likvaĵo (R).
- 9 — Ago flati.
- 10 — Sufikso. Tempomezurunuo. Prefikso montranta parencecon.

Vertikale :

- 1 — Multobligi.
- 2 — Libera spaco super la nuboj. Movo por salti (R).
- 3 — Io valora kiun oni lasis ĉe iu (R).
- 4 — Sufikso esprimanta kolekton. Postularoj.
- 5 — Titolo de iaj altfunkciuloj en Britujo. Artikolo.
- 6 — Multvalora metalo (R). Genro de mevoj (R).
- 7 — Sufikso montranta kolektivecon. Tribuno.
- 8 — Akva feo. Elementa peceto.
- 9 — Nombro. Nepublika (R).
- 10 — Interjekcio. Skandinavia monero (R). Nedefinita pronomo.

(R) = nur radikoj.

Novaj problemoj

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

ENIGMO

1. La naskiĝjaron de Zamenhof multobligu per la naskiĝmonato.
2. Al la ricevita sumo aldonu la mortojaron.
3. La sumon dividu per la naskiĝtago.
4. La rezultatan multipliku per la mortotago.
5. Aldonu la jaron de la apero de Esperanto.
6. La sumon obligu per la mortomonato.
7. Deprenu la jaron de la unua universala kongreso de Esperanto.
8. La ricevitajn nombrojn obligu per la nombro de liaj infanoj.
9. Deprenu la numeron de la kongreso de Esperanto de 1959.
10. Dividu per la nombro de la pintoj de la verda stelo.
11. Deprenu la nombrojn de la filoj de D-ro Zamenhof.
12. Dividu per la nombro de liaj filinoj.
13. Deprenu la nombrojn de liaj geavoj.
14. Dividu per la nombro de la gramatikaj reguloj en la « Fundamento de Esperanto ».
15. Aldonu la nombrojn de la kontinentoj, en kiuj Esperanto estas parolata.
16. Dividu per la nombro de la koloroj en la esperantista flago.
17. Fine aldonu la nombrojn de la literoj en la unuaj du linioj de la poemo de Zamenhof « Al la fratoj ». — Kiel finrezultaton vi ricevos faman nombrojn, kiu estas konata el la mondliteraturo.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

IO

DIFINO (PIV) :

Nedifina pronomo montranta objekton, aferon aŭ ideon : (Por montri personon oni uzas IU).

IO, pronomo, estas en singularo, kiel subjekto aŭ suplemento :

- io mankas en la skribilaro.
- mi atendis aŭdi ion novan.

RIM : por tiu Pronomo, la korelativa rilatpronomo estas KIO :

- okazis io, pri kio mi nenion scias.

IO : povas esti uzata kiel Substantivo ; ĝi povas stari en pluralo :

- lia potenco konsistas el diversaj ioj.

RIM : por tiu Substantivo, la korelativa rilatpronomo estas KIU.

- ni ekzameni la diversajn iojn, kiuj igis lin potenca.

AJN : povas akcenti la nedefinitecon.

- en tiaj cirkonstancoj, io ajn povas okazi.




Neatendita frandajo :

He ! Ho ! miaj karuloj ! Ne tiel rapide preterpasu tiun neĝhomon ! En la hodiaŭa frosta vetero, la frandajoj estas raraj ; bone memoru, ke, el la kapo de tiu neĝhomo elstaras io agrable gustumebla.



Al io bona malfeliĉo helpas :

Ho ! karulo mia ! ion agrablan mi havas por diri al vi : la asekur-kompanio tute ne avare repagis la elspezojn, kiujn via akcidento okazigis.



Kvazaŭa Damoklo-spado :

Ha lo ! Ha lo ! la valo ? ĉu vi aŭdas ? Mi atentigas vin pri la fakto, ke io grava povus esti tui minaconta vin : danĝero de lavango !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (4.80 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).
- Finnlando** : Libro Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).
- Germanujo Okc.** : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).
- Hispanujo** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10^a - D ALICANTE (650 pes.).
- Israelo** : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).
- Italio** : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).
- Japanujo** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Solveien 143-B, LJAN (40 kr.).
- Peruo** : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).
- Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).
- Svedujo** : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).
- Svislando** : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).
- Usono** : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitan

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...



Il est impossible de faire dès maintenant le point sur ce qu'a été l'année pour la Maison Culturelle. Un bilan financier approximatif sera présenté lors de la prochaine réunion du Conseil d'administration qui aura lieu à la fin du mois d'octobre, mais les éléments en notre possession ne sont pas suffisamment précis. Il apparaît cependant que le nombre de stagiaires n'a pas été supérieur à celui de l'an dernier. La participation d'espérantistes venant de pays étrangers semble s'affirmer surtout au mois de juillet. S'affirme également, et cela est extrêmement gênant, l'instabilité des durées de séjour annoncées ; un nombre croissant de personnes arrivent avant ou après la date prévue, en prévenant très tardivement ou ne prévenant pas du tout, ou partent avant la date annoncée. Ces changements posent souvent des problèmes difficiles à résoudre. Comment faire comprendre aux stagiaires qu'ils doivent faire tout leur possible pour respecter les dates annoncées ? Ça ne paraît pas facile, et cependant cela complique la tâche des responsables.

Quelques suggestions ont été faites pendant l'été. Certaines sont contradictoires : il paraît difficile de raccourcir et d'allonger à la fois les temps de séjour dans les salles de cours ou les ateliers. D'autres abordent des problèmes déjà soulevés et résolus ou en voie de réalisation : présentation constante des livres du Libro-Servo ; maison ouverte à d'autres associations pour des stages, ce qui se fait couramment. Enfin, il en est dont la réalisation n'est pas aussi simple qu'il paraît. Il avait été décidé, il y a longtemps, de placer un panneau « Interdit au public » à l'entrée de la propriété pour éviter la visite intempestive de touristes intéressés par le château et pas du tout par l'Espéranto, et qui se promènent, même à l'intérieur (cela est arrivé), sans rien demander à personne. En dehors des périodes d'ouverture, ce panneau permet au jardinier de demander aux chasseurs ou pêcheurs éventuels ce qu'ils font là malgré l'interdiction. Les panneaux de l'entrée sont à refaire, et il faudra sans doute en modifier le texte en insistant sur l'appellation « Maison Culturelle Espérantiste », plutôt qu'usur le terme « château ». On pourrait inviter les personnes intéressées par l'Espéranto à s'adresser au bureau. Mais l'organisation d'une « exposition gratuite et ouverte à tous » pose des questions de matériel, de personnel et de lieu, les salles du château étant occupées à plein.

Le Conseil d'administration examinera toutes ces questions lors de sa prochaine réunion. Il fixera également, le même jour, le calendrier des activités 1980.

P. BABIN.

INTER NI

Estas malfacile diri jam, kia estis la jaro 1979 por la Kulturdomo. Provizora financa bilanco estos prezentita okaze de la venonta kunveno de la Konsilio. Jam ŝajnas, ke la nombro da restadantoj estis proksimume la sama, kiel lastan jaron. La nombro da eksterlandaj vizitantoj kreskas iom post iom. Sed pli kaj pli malfacila estas la tasko de la respondeculoj ĉar multaj staĝanoj ne venas la ĝustan daton anoncitan; tro fruaj aŭ malfruaj alvenoj estas tre ĝenaj. Kion fari por ke ĉiuj restu fidelaj je la datoj de alveno, kiujn ili mem anoncis?

Sugestoj estis faritaj dum la somero. Kelkaj kontraŭdiras unu la alian. Aliaj koncernas jam realigitajn aŭ realigatajn projektojn. Aliaj aludas problemojn studatajn jam de pluraj jaroj sed kies solvoj ne estas tiel simplaj, kiel oni kelkfoje kredas. Unu el ili estas, kiel venigi la « eksterajn » homojn, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj eksterteni tiujn, kiuj nur deziras vidi unu plian kastelon? Ni studos novan tekston por la paneloj situantaj ĉe la enirejo.

La Konsilio studos tiujn problemojn kaj prenos la venontjaron kalendaron.

★ ★

NOS JOIES

Christian Bertin et Monique Le Port se sont mariés fin septembre. Avec nos amitiés, nous leur présentons tous nos vœux.

Lisa, fille de nos bons amis Bodereau, est devenue madame Mondolini en juillet. Nos félicitations à nos amis et tous nos vœux à Jean-Paul et Lisa.

★ ★

NOS PEINES

Max Bénistant, professeur à Evian, est décédé au mois d'août. Il était le fils de nos amis Bénistant, du Mans. Que ses parents sachent que nous partageons leur peine et acceptent notre amicale sympathie.

★ ★

FONDUSO « FOTOKOPILO »

Liste précédente :	2 287
Sino Mongilardi	200
Sro Antoni	74

Sume 2 561

APPEL

Dans la bibliothèque de Grésillon manquent quelques numéros de certaines revues. Si vous disposez des exemplaires qui nous font défaut, pouvez-vous nous les donner ou nous faire une proposition de vente? Merci.

LA PIRATO — 1-a jaro : numeroj 2, 3, 4, 5.

2-a jaro : numero 2.

3-a jaro : numero 4.

NICA REVUE — 1-a jaro : numeroj 1, 2, 3, 4, 5.

2-a jaro : numero 4.

4-a jaro : numero 2.

5-a jaro : numero 26 (nov.-dec.).

6-a jaro : numeroj 35 (majo-junio), 37 (sept.-okt.), 38 (nov.-dec.).

7-a jaro : numero 42 (lasta).

Pour compléter les connaissances que vous avez acquises à GRÉSILLON, ou pour préparer pendant l'hiver votre prochain séjour d'été à la MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE

Pensez à...

nos cours par correspondance

spécialement étudiés pour vous permettre de progresser, et corrigés par des personnes compétentes.

NOTRE LIBRO-SERVO

qui vous propose un choix de livres d'études, et aussi de romans ou de recueils de poésies.

S'adresser à :

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon, 49150 BAUGE

SERVICE-LIBRAIRIE

Adresser les commandes à : S-ro CIRET, « La Timeraie », Vieil-Baugé, 49150 BAUGÉ

LIVRES D'ETUDE ET DICTIONNAIRES

Comment former un Centre Culturel (conseils aux groupes)	5,00
Dictionnaire Français-Esperanto (Léger-Albault)	26,00
Dictionnaire pratique d'Esperanto (Esp.-Fr., Fr.-Esp.)	40,00
Diskokurso « Tra la mondo » (7 libretoj + diskoj) (Ribot)	100,00
Esperanto por infanoj (Solomon)	8,00
Falsaj amikoj (Bernard-Ribot)	5,00
Gramatika gvidlibro (G.E.E.)	8,00
Grand dictionnaire Esperanto-Fr. (Waringhien)	60,00
Gvidlibro de F.E.I. por la ekzamenoj ..	4,00
Junulkurso	20,00
» (complément)	5,00
» (5 diskoj)	30,00
Konversacia vortaro	2,50
La esperanta konjugacio (Jung)	20,00
Lexique fondamental (Léger)	8,00
Ludoviko en Nederlando (Delaire) ..	40,00
Manuel d'initiation (Thaillet)	4,00
Manuel d'étude (Couteaux)	6,00
Manuel de perfectionnement (Couteaux)	6,00
Militista vortareto	5,00
Ni parolu en Esperanto (Ribot)	8,00
Nos premiers pas (Ribot)	4,00
Nouveau cours rationnel	30,00
Oportuna vortaro (Setälä)	15,00
Paŝoj al plena posedo (Auld)	25,00
Plena ilustrita vortaro	180,00
Plena vortaro de Esperanto kun sup. ..	38,00
Por la praktikantoj (Babin)	20,00
Précis grammatical (Ribot)	3,00
Premier manuel	4,00
Privilegia vojo (Setälä)	16,00
Programme et règlement des examens	1,50
Sub la verda standardo (Korte)	
laborilo 1	7,00
laborilo 2	8,00
gvidlibro	9,00
Textes de préparation à l'Atesto pri Kapableco (Ribot)	8,00
» korektoj	5,00
Tu seras esperantiste (Delaire)	12,00
Une langue internationale	5,00
Vocabulaire Esperanto (Duc Goninaz) ..	15,00

DISQUES

Elektitaj eroj (N. Rytjkov)	40,00
Tra la mondo (O. Tzant)	50,00

LITTERATURE

ABC d'Esperanto (Waringhien)	8,00
ABC — noveleto (Orzeszko)	10,00

ABZ de amo	75,00
Amara pano (Darvas)	12,00
Anni kaj Montmartre	20,00
Arĉoj (Matton)	12,00
Asteriks la Gaŭlo	25,00
Aŭtografio de D-ro Zamenhof	3,00
Boulogne, testo kaj triumfo	3,00
BT l'Esperanto (Lentaigne)	8,00
Cigana romancaro (Garcia Lorca) ..	15,00
Ĉiu ĉiun (Teo Jung)	80,00
Ĉu li bremsis sufiĉe ? (Valano)	30,00
Ĉu vi kuiras ĉine ? (Valano)	30,00
D-ro Dorner (Egerrup)	30,00
Dona Barbara	38,00
Dorse kontraŭ la muro (Wybenga) ..	24,00
Dudek-kvin jaroj (belartaj konkursoj) ..	25,00
Duonoĉo (Maura)	12,00
Ekzilo kaj azilo (Emga)	12,00
Elektitaj paroladoj... (Lapenna)	25,00
Elektita verkaro (Botev)	20,00
El la vivo de berala sentaŭgulo	20,00
Eta vivo (Guglielminetti)	15,00
Esperanto en perspektivo	185,00
El la polvo de la tero (Rolt)	15,00
El la verda biblio	20,00
Fabeloj pri bona suneto (por infanoj) ..	20,00
Fabloy (Krilov)	50,00
Facetoj de Esperanto (Auld)	12,00
Fajro sur mia lango (de Kock)	12,00
Federala sperto (Privat)	10,00
Fianĉo de l'orto (Rosbach)	40,00
Foĉjo kaj Ozak (por infanoj)	10,00
Forkaptita (Stevenson)	28,00
Fundamenta krestomatio	60,00
Fundamento de Esperanto (bindita) ..	35,00
» (broŝurita)	25,00
Gajaj klubvesperoj (Riisberg)	5,00
Gaja leganto per Esperanto (Schweirin) ..	6,00
Gudrun (Jensen)	30,00
Hameleto (Shakespeare/Newel) broŝurita ..	22,00
Hamleto (Shakespeare/Zamenhof) bindita ..	25,00
Humoroj (Auld)	15,00
Invit'al Japanesko (Masao)	15,00
Islandaj pravoĉoj	25,00
Japana kvodlibeto	15,00
Jolanto (Hertz)	5,00
Junaga verkaro (Privat)	15,00
Kalevipoeg (Kreutzwald)	10,00
Kanako el Kananam (Linton)	25,00
Kantoj kaj romancoj (Heine)	30,00
Kara diablino (Boatman)	22,00
Karlo (Privat)	5,00
Kaŭkazaj rakontoj (Lermontov)	12,00
Kie boacoj vagadas (Salovaara)	12,00
Kiel akvo de l'rivero (Schwartz)	45,00

Kredu min, sinjorino (Rossetti)	20,00
Krioj el mallumo (Svetner)	10,00
Krucenigmoj	7,00
La aventuroj de Stultulo	20,00
La besto — farmo	25,00
La dia avarulo	22,00
La filo de ŝtonkora homo	13,00
La firmao de la kato kiu pilkludas ..	10,00
La forto de l'vero (Adi)	10,00
La gaja forgiŝto	12,00
La granda kaldrono (Francis)	90,00
La ĝoja podio (Schwartz)	28,00
La homaranismo (Van Kleeft)	3,00
La infana raso (Auld)	25,00
La justuloj (Camus)	15,00
La lernolibro de la vivo (Kojé)	10,00
La mokindaj preciozulinoj (Molière) ..	5,00
La naŭzo (Sartre)	24,00
La nekonata konata	16,00
La normandaj rakontoj (Maupassant) ..	36,00
La marvirineto (Andersen)	18,00
La perdita honoro de iu K. Blum	25,00
La perdita vizaĝo (Nesvadba)	8,00
La profeto (Gibran)	14,00
La stranga butikoj	20,00
La sunkrono (Koenen)	10,00
La tempesto (Shakespeare)	12,00
La tragedio de l'homo (Madach) ..	20,00
La trofeoj (Heredia)	25,00
Le Dr Esperanto (Ziolkowska) bro-	
ŝurita	10,00
» bindita	16,00
Libro de amo	35,00
Lingvaj respondoj broŝurita	12,00
» bindita	15,00
Lingvo kaj logiko (Goodheir)	4,00
Liriko (Ukrainka)	6,00
Marta (Orzeszko)	22,00
Martin Fierro (Hernandez)	30,00
Medalionoj (Malkowska)	10,00
Metropoliteno (Varankin)	48,00
Mi amis junulinon (Trobish) bro-	
ŝurita	15,00
» bindita	20,00
Mi estas Pele	30,00
Modesta bukado (Jost)	5,00
Naskiĝo de Esperanto-Domo	5,00
Natan la saĝulo (Lessing)	3,00
Neologismo	25,00
Ni devas vivi (Gabrielli)	18,00
Norda naturo (Dresen)	16,00
Nova butikisto de Nukugaia	35,00
Nova Ezopo (Urban)	10,00
Ne plu ludo (Barthelmes)	12,50
Noktoj	8,00
Nur tri kolorojn (Urbanova)	10,00
Okupacio (Krusten)	6,00
Ora duopo	15,00
Petro	6,00

Pinta krajono (Rossetti)	20,00
Poeziaĵoj (Tuwin)	8,00
Primico (Tagor)	25,00
Palaco de danĝero (Wagnalls)	8,00
Printempo en la aŭtuno (Baghy)	5,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev) ..	10,00
Raymond Schwartz (Bernard)	12,00
Rozoj kaj urtikoj (Thorsen)	20,00
Schlemihl (Chamisso)	8,00
Senĝenaj dialogoj (Fernandez)	30,00
Sen paraŝuto (Thorsen)	10,00
Sileziaj kantoj (Berzruć)	12,00
Servokapablaj (Eekhoud)	3,00
Sklavoj de Dio (Gardonyi)	20,00
Soifo (Tarkony)	15,00
Somermeznoĝa sonĝo (Shakespeare) ..	20,00
Sub stelo rigida (Hamri)	12,00
Sur la vivovojo (Logvin)	12,00
Teatro (Sartre)	15,00
Tartarin de Taraskono (Daudet)	20,00
Tra dezerto kaj praarbaro	30,00
Trans la fabeloceano (Szilagyi)	25,00
Trigoŝa romano	50,00
Tri verkoj (Voltaire)	25,00
Unufingraj melodioj (Auld)	20,00
Vage tra la dimensioj	16,00
Venis viro (Nielsen)	20,00
Vesperkanto (Adamson)	12,00
Vitrilo (Francis)	12,00
Vivendo	30,00
Vivo de Tolŝtoj (Lebrun)	80,00
Vojaĝo al Kazohinio (Szathmari)	26,00
Vojo kaj vorto (Nogueira)	20,00

HISTOIRE - GEOGRAPHIE - SCIENCES

Aktualaj problemoj... (Lapenna)	12,00
Andoro	10,00
Dialekto, dialektiko (Dalmau)	4,00
Enkonduko en libroskiencon	10,00
Esperantologiaj studoj (Würster) ..	50,00
Estonio	5,00
Gvidlibro tra Parizo	19,00
Historio de la lingvo (2a parto)	12,00
La bela subtera mondo	12,00
La dolĉa Franclando (Delaire)	45,00
La internacia kuirlibro	25,00
La Sankta Biblio	60,00
Loire-kasteloj (Retot)	4,00
Planlingvaj problemoj (Gilbert)	20,00
Prezidanto Ho-chi-Minh	5,00
Pri lingvo kaj aliaj artoj (Auld)	40,00
Retoriko (Lapenna)	53,00
Sekretoj de la marestaĵoj (Guinio) ..	12,00
Simpozio pri ata-ita	45,00
Totala suneklipso	10,00
Une humanité, une langue (Glodeau) ..	5,00
Vivo de Zamenhof (Privat)	42,00

Nous pouvons livrer également toutes les nouveautés

Les prix sont indicatifs. Ils sont malheureusement sujets à des hausses

KULTURAJ KAJEROJ

1979

SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

George Sand

E. Motillon

Leonardo de Vinĉi kaj la biciklo

R. Lloancy

Estas neniu rajt' sen devo.

La devoj de la homo

F. Boyet

Vespermanĝo kun Teodoro Schwarz

B. Golden

Balado pri Roald Amundsen

A. Logvin

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn orelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.